# *Kubo elektitas kiel la unua kultura celloko en Ameriko*



**Foto: ACN**

Havano,  jan 11 (RHK) La Kuba Ministerio pri Turismo de Kubo (Mintur), reliefigis  la lastatempan elekton de la kariba lando kiel la unua kultura destino vizitinda en la amerika kontinento ?i-jare, la? la presti?a revuo National Geographic.

En la socia reto X, Mintur ligis artikolon de la revuo Buen Viaje, kiu aludas al publika?o aperinta en National Geographic, datita la 6-an de januaro, kie ?i indikis Kubon kiel la unuan kulturan cellokon en la Amerikoj en 2024.

> National Geographic elektas Kubon kiel la unuan kulturan cellokon en la Amerikoj. #Cuba #CubaUnica Pliaj informoj ?i tie: https://t.co/ute53IxvX6 pic.twitter.com/OHPDjhtwbA
> — Ministerio pri Turismo (@MinturCuba) la 10-an de januaro 2024

National Geographic revuo publikigis la opiniojn de kvin ekspertoj kiuj partumis siajn plej ?atatajn kulturajn cellokojn en Norda kaj Sudameriko, kontinentoj kiujn ili konsideris bonega kultura celloko.

La specialistoj invitis homojn esplori la buntajn stratojn de kolonia Havano kaj aliaj lokoj en la lando, kaj anka? rekomendis voja?i al Peruo, spuri la radikojn de usona muziko en la tiel nomata Profunda Sudo, kaj viziti Meksikon kaj Kolombion, en tiu ordo.

La unua loko en la listo de plej ?atataj kulturaj cellokoj en Ameriko estas okupata de la kuba ?efurbo, markita de diversaj influoj afrikaj, karibaj kaj hispanaj; la specialistoj proponis, ke legantoj vizitu anka? la valon Viñales, la duoninsulon Zapata kaj Cienfuegos en Kubo.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/economia/344202-kubo-elektitas-kiel-la-unua-kultura-celloko-en-ameriko

**Radio Habana Cuba**